## Doktoro, al mi doloras la ... Ne gravas: vi devas nur...

Mi malsatas!

**Mi soifas!!**

Mi malvarmumas!

- kapo!
- koro!
- piedoj!
- lango!
- konscienco!
- dento!
- animo!
- sid-vangoj!
- stomako!
- okuloj!
- monujo!
- mano!
- dorso!
- gorĝo!
- ostoj!
- oreloj!
- stomako!
- mem-estimo!
- hepato!
- renoj!
- .........
- .........

*1. …trinki tutan litron da akvo!*
*2. … meti du tranĉaĵojn da kukumo sur la okulojn!*
*3. …trinki varman lakton kun mielo kaj rumo!*
*4. …ricevi nun masaĝon de la tuta korpo!*
*5. …fari malvarmegan piedbanon!*
*6. …ricevi kison sur la frunto!*
*7. …viziti bonan mens-kuraciston!*
*8. …esti sengrumble pacienca!*
*9. …iomete flugi en la ĉambro!*
*10. …tuj enlitiĝi!*
*11. …fasti dum la tuta semajno!*
*12. …dormi sola ĉi-nokte!*
*13. …danci dum la tuta nokto!*
*14. …laŭte kanti por la publiko!*
*15. …kalkuli ŝafojn ĝis mil!*
*16. …urĝe viziti bonan restoracion!*
*17. …imiti krokodilon!*
*18. …ricevi Nobel-Premion!*
*19. …manĝi kilogramon da glaciaĵo!*
*20. …fari donacojn al mi!*
*21. …trovi fadenon kaj pezan pordon!*
*22. ................................*



Mi perdas mian paciencon....!!!

Mi timas ke mi eble 'iomete' gravediĝis...

# Konsiloj por la uzo de la ekzerco

Mi komencas la aktivaĵon subite mimante grandan doloron kaj kuracante min per amuza rimedo (glaso da brando?).
Se la grupo estas multkultura, mi poste inventarie pridiskutas kun la grupanoj la de ili konatajn popolkuracteknikojn por la ordinaraj doloroj (ekz. dentoj, okuloj, oreloj...), tiel kreante ĝojan etoson.
Poste mi oficiale elektas kelkajn 'kuracistojn' (pli malpli kvaronon de la grupanoj), kiuj tronas kun granda aŭtoritato sur seĝoj en diversaj lokoj de la salono. Ilia rolo estas tre serioze kaj pompe 'helpi' la malsanulojn (= la aliajn kursanojn) kiuj, kurante de unu al la alia doktoro, deklaras sin malsanaj (maldekstra ruĝa frazaro sur la papero). Kiu ajn estas la doloro/malsano, la doktoroj sekvas la protokolon, t.e. ke ili donas la respondojn en la sekvordo de ilia (dekstra blua) listo. Notu ke ĉiu devas paroli per plenaj frazoj. Kun iom da teatremo, ene de du minutoj, ĉiu parolas, ridas, provas kaj reprovas, kaj lernas senkonscie.
Estas amuze havi ankaŭ kelkajn ilojn (blanka vestaĵo, ruĝa kruco, unuahelpa ekipaĵo, bandaĝoj) por krei aŭtentikan etoson.

N.B. La ekzerco ne estas por instrui la leksikon (korpopartoj, ktp), sed ekzercigi ilin en amuza maniero.